SESA PASKA DIMANĈO – 9a de majo 2010

LA SANKTA SPIRITO VIN REMEMORIGOS PRI ĈIO; KION MI DIRIS AL VI-
Komentario al la Evangelio de P. Alberto Maggi OSM

Joh. 14, 23- 29

En tiu tempo Jesuo diris [al siaj disĉiploj] Se iu min amas, tiu observos mian vorton; kaj mia Patro lin amos; kaj ni venos al li kaj faros loĝon kun li. Kiu min ne amas, tiu ne observas miajn vortojn; kaj la vorto, kiun vi aŭdas, estas ne mia, sed de la Patro, kiu min sendis.

Tion mi parolis al vi, dum mi ĉe vi restas. Sed la Parakleto, la Sankta Spirito, kiun la Patro sendos en mia nomo, instruos vin pri ĉio, kaj vin rememorigos pri ĉio, kion mi diris al vi.

Pacon mi lasas al vi; mian pacon mi donas al vi; ne kiel la mondo donas, mi donas al vi. Ne maltrankviliĝu via koro, nek senkuraĝiĝu.

Vi aŭdis, ke mi diris al vi: Mi foriras, kaj mi revenas al vi. Se vi min amus, vi ĝojus pro tio, ke mi iras al la Patro, ĉar la Patro estas pli granda ol mi. Kaj nun mi diris al vi, antaŭ ol ĝi okazos, por ke vi kredu, kiam ĝi okazos.

La vortoj de Jesuo kiujn ni tuj komentarios estas gravegaj se oni ilin komprenas, ili tute ŝanĝas nian rilaton al Dio kaj, sekve tiun al niaj fratoj. Ni vidu ilin.

Jesuo estas respondanta al Judaso, ne al iskarioto sed al alia kiu demandis al li: “Sinjoro, kio okazis, ke vi elmontros vin al ni, kaj ne al la mondo?”. Judaso Tadeo sin turnas al Jesuo kiel faris siaj fratoj kiuj diris: “Se vi faras tiajn aferojn manifestu vin al la mondo”; ili ne komprenas kial do Jesuo ne manifestiĝas al la homamaso per eksterordinaraĵoj kaj spektaklaĵoj.

Kaj jen la grava respondo de Jesuo: “Se iu min amas, tiu observos mian vorton”, observi la vorton de Jesuo signifas esti rekoninta en tiu vorto la krean forton de Dio, kaj en tiu vorto mem la respondon de Dio al deziro pri pleno da vivo kiun ĉiuj homo havas en si mem.

Kiel respondo de Dio al tiu konsento al Jesuo, “Mia Patro lin amos”, kaj jen la eksterordinara novaĵo, “kaj ni venos al li kaj faros loĝon kun li”. La Dio de Jesuo ne estas Dio kiu ensorbas la homon por si mem, sed li estas la Dio kiu lin plifortigas; li estas Dio tiel enamiĝinta al la homaro ke li petas de ĝi esti akceptata en ĝia vivo por unuiĝi al ĝi, plifortiginte kaj plivastigante ĝian amkapablon.

La homo ne eniras la ĉielon, sed estas la ĉielo kiu venas fari loĝon kun la homo kaj tiel ĉiu homo, ĉiu komunumo fariĝas la ununura vera sanktejo en kiu sin montras la amo de Dio al la tuta homaro.

Ĉi tie la evangeliisto memorigas kion li jam skribis en la komenco de lia Evangelio, en la Prologo, “Dio metis sian loĝejon inter ni”. Ĉiu krejtaĵo, ĉiu homo estas tiu sanktejo.

Tiu ĉi ne estas promeso por la transmondo, sed ĝi estas respondo de la Patro al tiuj kiuj konsentas al Jesuo. Kiu lin ne amas tiu ne observas liajn vortojn ĉar li ne rekonas en tiuj vortoj la krean forton, kaj Jesuo certigas: “la vorto, kiun vi aŭdas, estas ne mia, sed de la Patro, kiu min sendis”.

La Patro de Jesuo daŭrigas sian saman krean agadon pere de la agoj kiuj komunikas vivon al la homo. Kaj poste jen la promeso de Jesuo, la promeso pri la alveno de la Parakleto, temas pri greka vorto kiu indikas la helpanton, la savanton, kaj tiu estas la agado de la Sankta Spirito, Spirito kiun oni nomas “Sankta” ne tiom pro la kvalito kiom pro ĝia aktiveco kiu estas sanktigi, nome disigi la homojn de la agadkampo de la malbono.

La agado de la Spirito ĉe la kredanto kaj ĉe la komunumo kia ĝi estas? “Li instruos vin pri ĉio, kaj vin rememorigos pri ĉio, kion mi diris al vi”. La vorto de Jesuo kaj lia mesaĝo estas tiel grandaj, tiel vastegaj ke la homo per siaj propraj menslimoj ne povas ilin kompreni ĉiujn la unuan fojon, per ununura sperto, sed laŭgrade kiam li akceptas tiun vorton kaj ĝin realigas pere de agoj kiuj komunikas vivon al aliuloj, tiam plivastiĝas, dilatiĝas lia amkapablo kaj li permesas al tiu ĉi vorto esti ĉiam pli bone komprenata.

Jesuo nin certigas ke la tasko de la Spirito en sia komunumo ne estas anonci novan mesaĝon, sed ĝi estas rememorigi kaj konsciigi nin pri la povo de tiu mesaĝo. Jesuo certigas nin ke antaŭ la novaj bezonoj, la novaj situacioj, la novaj neantaŭvideblaĵoj kiuj okazos en sia komunumo la Sankta Spirito ĉiam scios doni novajn respondojn al novaj bezonoj.

Poste Jesuo finas dirante: “Pacon mi lasas al vi; mian pacon mi donas al vi”, tiu ĉi estis la kutima saluto, “ne kiel la mondo ĝin donas, mi donas al vi”, nome en la tiutempa medio oni donis tiun salutvorton, oni tiamaniere salutis la forirontojn, kontraŭe, ĉi tie estas Jesuo kiu foriras, kiu donas tiun pacon al siaj disĉiploj kaj petas de ili ke ili ne timu, ke ili lasu lokon al la amo por ke ili ne timu, ke ili lasu lokon al la amo por ke ĝi anstataŭu la timon.

Kial? Ĉar li diras: “Se vi min amus, vi ĝojus pro tio, ke mi iras al la Patro”. Jesuo ne pripensas siajn suferojn sed la bonon por siaj disĉiploj. Li jam pripensas la bonon venontan el sia morto, el la donaco de sia vivo kaj el la komunikado de la Spirito al siaj disĉiploj.

Kaj poste jen la fina averto: “Mi diris tion al vi, antaŭ ol ĝi okazos”. Kio okazos? Okazos la drama momento de la arestado de Jesuo, kiu estas kaptita kiel bandito kaj krimulo, okazos la drama momomento de lia ekzekuto kiam li estos mortigita kiel krimulo, kiel malbenita de Dio.

Nu, Jesuo diras: “Mi diris tion al vi, antaŭ ol ĝi okazos, por ke vi kredu, kiam ĝi okazos”, nome por ke vi daŭrigu kredi je Jesuo la filo de Dio. Kredante je Jesuo ili ĉesos kredi je la ĉefsacerdoto, kredante je Jesuo ili ĉesos kredi je la religia institucio kaj ili povos malfermiĝi al tiu ĉi granda realaĵo de Dio kiu ne estas malproksima, ne estas disigita, sed kiu petas loĝi en la homojn; Dio kiu ne plu petas ke oni vivu por Li, sed kiu petas ke oni vivu per Li, kun Li kaj kiel Li..